

Christian Morgenstern,

La du radikoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Du dikaj radikoj de abi'
 en la arbaro inter si
 parolas pri l' arbopinta susur',
 dum sidas ĉe ili maljuna sciur'
 trikanta ŝtrumpojn por tiuj du,
 ke ili ne frostu dumvintre plu.
 "Knig", diras l'unua, l'alia "knag".
 Sufiĉas tio por unu tag'.

*Traduko de la Germana poemo "Die zwei Wurzeln" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1985-03.*

Arg-75-147 (2003-11-02 08:56:05)

Christian Morgenstern,

La du radikoj

tradukita de Richard Schulz

Najbara kaj abiradika paro
 konversacias en arbaro.
 La pintoj supre multon ja susuras.
 Ĉi-sube la radikoj nur murmuras.
 Sciur' maljuna sidas en proksimo,
 kulturamas sian pacon en animo.
 L'unua diras: knig', la dua: knago.
 Sufiĉas tio ĉi por unu tago.

*Traduko de la Germana poemo "Die zwei Wurzeln" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1980.*

Arg-75-984 (2013-02-26 15:12:28)

Mi, Manfred Retzlaff, publikigas tiun ĉi tradukon de la poemo kun permeso de s-ano Hermano Bermano (Hermann Behrmann, Schevenstr. 12 B, D-01326 Dresden, Germanujo). Mi trovis la tradukon en la libro "Pendumilaj Lidoj laŭ Kristiano Morgenŝterno", eldonejo Bleicher, 1980, ISBN 3-88350-501-3. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.